

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo, 6-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 538, 1974.01.30 & 02.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni konkludos nian prelegserion pri interesa enketo, kiu tuŝis en 1971 sep procentojn de la junularo 16-20-jaraĝa de la kanton Neuchâtel, prezentante al vi tion, kion la junularo opinias pri la geedziĝo, pri la infanoj kaj fine pri la seksaj rilatoj. Ni dediĉos niajn du lastajn prelegojn al tiu vastega temo. Ni memorigas al vi, ke la proporcio de la demanditoj respegulas la ĝeneralan socian situacion de la samaĝa junularo. El tio la valoro de tiu enketo.

A.- Al la demando, ĉu vi antaŭvidas, ke vi edziĝos aŭ edziniĝos, nur 5 procentoj de la demanditoj respondis negative. Preskaŭ ĉiuj gejunuloj rigardas al la estonteco kun la certeco, ke ili baldaŭ geedziĝos.

Cl.- La enketo informiĝis pri la ideala aĝo por geedziĝi. La ricevitaĵoj respondoj donas : por edziniĝi : 22 jaroj ; por edziĝi : 26 jaroj. La gejunuloj opinias, ke la knaboj devas edziĝi pli malfrue, ol la knabinoj edziniĝi. 80 procentoj de la demanditoj antaŭvidas geedziĝi inter 20 kaj 30 jaroj.

A.- Kiel la gejunuloj vidas la geedziĝon ? 70 procentoj respondis, ke la geedziĝo estas la plej taŭga maniero gevivi, kiam amo ekzistas. Krome 15 procentoj opinias, ke la geedziĝo estas vivformulo kun tre grandaj maloportunaĵoj, sed ke ne ekzistas pli taŭga vivformulo.

Cl.- Estas interese konstati, ke la procentaĵo, kiu sin prononcis kontraŭ la geedziĝo, sin retrovas por proklami, ke la geedza vivo havas pli da maloportunaĵoj, ol da oportunaĵoj : 5 procentoj.

A.- Tiu enketo montris, ke la knaboj estas malpli entuziasmaj por edziĝi, ol la knabinoj por edziniĝi, kaj la gestudentoj, ol la meti-gelernantoj.

Cl.- Fakte la geedziĝo estas ĝenerale rigardata kiel socia institucio, kiu meritis iujn strukturajn reformojn.

A.- La ĉefa maloportunaĵo de la geedziĝo estas la perdo de la propra libereco : 15 procentoj. La financaj zorgoj estas menciataj inter la maloportunaĵoj nur je 5 procentoj. La ĉeesto de infanoj ne estas rigardata kiel maloportunaĵo. La financaj zorgoj, kiuj regadis en la antaŭaj generacioj, perdis parton de sia graveco por la nuna junularo vivanta en riĉa lando. La gejunuloj ŝatus povi geedziĝi konservante sian personan liberecon. Ili bedaŭras la perdon de sia fraŭla libereco. Tio klarigas ilian sintenon rilate al la divorco.

Cl.- Koncerne al la eks-geedziĝo aŭ divorco, oni konstatas, ke 40 procentoj de la gejunuloj opinias, ke divorco devus povi tuj okazi, kiam unu el la geedzoj ĝin petas. Inter la gejunuloj, neniuj sin prononcis kontraŭ la divorco. Divorco estas konsiderata kiel rimedo por ripari elekt-erarojn. Ŝajnas, ke la gejunuloj antaŭvidas la geedziĝon kun la ebleco povi ĝin facile rompi, se ĝi montriĝas nekontentiga.

A.- Demando tuŝis la malsukcesintajn geedziĝojn. Inter la paroj, kiujn vi konas en via familio kaj ĉe viaj gekonatoj, provu diri la procentaĵon de la geedziĝoj, kiujn vi konsideras kiel

sukcesintaj. Oni ricevas la respondon, ke proksimume la duono de tiuj geedziĝoj estas konsiderataj kiel sukcesintaj.

Cl.- Inter la kaŭzoj de la malsukcesoj oni ricevas la ĉi-sekvan liston : malbona reciproka antaŭkono : 40 procentoj ; tro junaĝa geedziĝo : 15 procentoj ; reciproka laciĝo : 10 procentoj ; reciproka egoismo : 10 procentoj ; reciproka manko de fideleco : 10 procentoj ; malsimila evoluo inter la geedzoj : 5 procentoj ; sin altrudo de la gepatroj aŭ bogepatroj en la vivon de la paro : 5 procentoj ; fizika malakordiĝo : 5 procentoj. Estas rimarkinde konstati, ke la infanoj kaj la laboro de la edzino neniam estas menciataj kiel kaŭzoj de malsukcesoj. Laŭ la grup-kategorioj : aĝo, sekso, profesiaj fakoj, oni ĉiam ricevas proksimume la samajn respondojn. La malfideleco ne plu estas konsiderata inter la ĉefaj kaŭzoj por la malsukceso de la geedza vivo, kvankam la fideleco restas konsiderata kiel grava faktoro por la geedziĝa harmonio.

A.- La venontan semajnon ni konkludos tiun prezenton de la vidpunktoj de la hodiaŭa junularo de la kantono Neuchâtel rilate al la geedziĝo, parolante pri la infanoj kaj pri la seksaj rilatoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!